**Saluton, Reĝino**, kompatema Patrino; nia vivo, nia ĝojo kaj nia espero, saluton! Al Vi ni vokas, ekzilitaj filoj de Eva. Vin ni petegas, ĝemante kaj plorante en ĉi tiu valo de larmoj.

Pro tio do, nia Perantino, rigardu al ni per viaj tiel kompataj okuloj. Kaj montru al ni post ĉi tiu ekzilo Jesuon, la benatan frukton de via sino.

Ho milda, ho pia, ho dolĉa Virgulino Maria.

*Preĝu por ni, Sankta Dipatrino, por ke ni meritu la promesojn de Kristo. Amen.*

**Ni preĝu:**

Dio, via unusola Filo al ni per sia vivo, morto kaj resurekto akirigis eternan savon.

Donu al ni, ni petas, kiam ni en la Sankta Rozario de la beata Virgulino Maria pri ĉi tiuj misteroj meditas, ke ni laŭ ili ankaŭ vivu kaj atingu tion, kion ili promesas.

Per Kristo, nia Sinjoro. Amen.

*En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito. Amen.*

# LA SANKTA ROZARIO

En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito. Amen.

***Mi kredas*** je Dio, la Patro ĉiopova, la Kreinto de la ĉielo kaj de la tero; kaj je Jesuo Kristo, lia ununura Filo, nia Sinjoro, koncipita per la Sankta Spirito, naskita el Maria la Virgulino, suferinta sub Poncio Pilato, krucumita, mortinta kaj entombigita, sobirinta en la regnon de la morto. La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj, supreniris al la ĉielo, sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova, de kie Li venos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

***Mi kredas*** je la Sankta Spirito, la sankta katolika Eklezio, la komuno de la sanktuloj, la pardono de la pekoj, la releviĝo de la mortintoj, kaj la vivo eterna. Amen.

***Patro nia***, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo. Venu via regno. Fariĝu via volo kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen.

***Saluton, Maria,*** gracoplena, la Sinjoro estas kun Vi. Benata Vi estas inter la virinoj kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.

*(Tri fojojn, kun jenaj aldonoj post "Jesuo"):*

**... KIU EN NI OBLIGU LA KREDON.**
**... KIU EN NI FORTIGU LA ESPERON.**
**... KIU EN NI FLAMIGU LA AMON.**

***Sankta Maria,*** Dipatrino, preĝu por ni pekuloj nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

***Gloro al la Patro*** kaj al la Filo kaj al la Sankta Spirito,

kiel estis en la komenco, tiel nun kaj ĉiam, kaj en eterno. Amen.

**Patro nia**, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo. Venu via regno. Fariĝu via volo kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni niajn šuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen.

**Saluton, Maria,** gracoplena, la Sinjoro estas kun Vi.

Benata Vi estas inter la virinoj kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.

La Misteroj - vidu aparte

**Sankta Maria,** Dipatrino, preĝu por ni pekuloj nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

**Gloro al la Patro** kaj al la Filo kaj al la Sankta Spirito,

kiel estis en la komenco, tiel nun kaj ĉiam, kaj en eterno. Amen.

***Sinjoro Jesuo, pardonu al ni niajn pekojn, gardu nin kontraŭ la infera fajro, konduku ĉiujn animojn en la ĉielon, precipe tiujn, kiuj plej multe bezonas vian kompaton.***

### *La Ĝojaj Misteroj*

1. ... kiun Vi, ho Virgulino, koncipis de la Sankta Spirito.
2. ... kiun Vi, ho Virgulino, portis al Elizabeta.
3. ... kiun Vi, ho Virgulino, naskis en Betlehemo.
4. ... kiun Vi, ho Virgulino, prezentis en la templo.
5. ... kiun Vi, ho Virgulino, trovis en la templo.

### La Doloraj Misteroj

1. ... kiu por ni ŝvitis sangon.
2. ... kiu por ni estis skurĝata.
3. ... kiu por ni estis dorno-kronita.
4. ... kiu por ni portis la krucon.
5. ... kiu por ni estis krucumita.


### La Doloraj Misteroj

1. ... kiu por ni ŝvitis sangon.
2. ... kiu por ni estis skurĝata.
3. ... kiu por ni estis dorno-kronita.
4. ... kiu por ni portis la krucon.
5. ... kiu por ni estis krucumita.


### *La Misteroj de la Lumo*

1. ... kiu estis baptita en Jordano.
2. ... kiu revelaciis en Kana sian Dian potencon.
3. ... kiu heroldis Dian Regnon kaj alvokadis al pento farado.
4. ... kiu sur la Monto de Transfiguriĝo revelaciis sian gloron.
5. ... kiu estigis Eŭkaristion.